Vi praktikos

Participoj adjektivaj

Ekzemplo:

Kio estas persono staranta ĉe semaforo?
Persono staranta ĉe semaforo estas persono kiu staras ĉe semaforo.

1 persono staranta ĉe semaforo (= trafiklumo)
2 personoj starantaj en halo de hotelo
3 geknaboj sidantaj sur la planko
4 policano helpanta turiston

5 turisto helpata de policano
6 fenestro fermita de vento
7 personoj vojaĝontaj tuj
8 personoj vojaĝintaj por skii en montaro

9 personoj vojaĝantaj tra Francio per la trajno TGV
10 pantalono ŝirita de dorno de rozujo
11 pantalonoj ŝiritaj de akraj objektoj
12 leteroj kaj poŝtkartoj skribotaj

13 sekretariino tajpanta leteron
14 vekiĝintaj gepatroj
15 vekitaj gefiloj
16 leviĝontaj knabinoj

17 rubo forigota el la loĝejo
18 cigaredo ekbruligita de alumeto
19 virino transiranta la straton
20 piedirantoj atendantaj ĉe la rando de trotuaro

21 gelernantoj ĉeestontaj la novan kurson en aŭtuno
22 lingvo parolata en Japanio
23 lingvoj parolataj en Svisio
24 studentoj studantaj la anglan lingvon kaj Esperanton